


HAMBURG
Esperanto



6/2001

Oktobro/Novembro

Bulteno de Hamburga Esperanto Societo r. a.

Kluba vivo plu okazos




Somera festo en la Hamburga klubejo 19-07-2001 - pro pluvo ne en la ghardeno. (Foto: J. Wulff)

Nova luprenanto por la oficejo estas trovita. La foriro de la ghisnuna luanto jam kauzis afliktighon al kelkaj klubanoj, ĉar sen la enspezoj el la forluado de parto de la domo ne eblas financi la domon. Dank' al la lerta agado de Jürgen Wulff la problemo jam estas solvita.

Nova luanto - novaj kondiĉoj

La nova luanto en la Esperanto-domo estas firmo kiu peras diversajn servojn al la klientaro. Interalie estas ankaŭ seminarioj por komerca trejnado, kiuj okazu en la suba etagho. Tio signifas, ke la nova luanto uzas ankaŭ la kluban salonon, dum kutima labortempo, kaj por tio ankaŭ pagas. Sekve al tio, nia salono ne plu estas sen utiligo dum la plej multa tempo, kiel ghis nun. Sed tiu duflanka uzado de la salono postulas iom pli da reciproka atento. Ni ja havos nian klubejon por niaj klubvesperoj kaj kursoj, sed ni ne plu povos gastigi vojaghantojn, kiel ghis nun. Sed ni konsideru, ke la vizitantoj de la dumtagaj seminarioj en la Esperanto-domo ankaŭ ekscios iom pri Esperanto (ekzemple per afiŝoj). Tiel ni krome ricevos senkoston varb-eblecon.

Benno Klehr

Sentenco	Editorajhoj
<p>La plej bona protekto kontraŭ teroro, perforto kaj milito estas justa internacia ordo.</p> <p>Prezidanto Johannes Rau</p>	<p>Redaktofino de</p>  <p>n-ro 5/01: 15-09-2001</p> <p>Eldonanto: <i>Hamburga Esperanto-Societo r. a.</i> Klaus-Groth-Str. 95, D-20535 Hamburg Tel/Faks: +49 40 250 30 65</p> <p>Prezidanto: Jürgen Wulff http://www.juergenwulff.de</p> <p>Redaktoro: Benno Klehr</p> <p>Retposhto: Hamburg@Esperanto.de (alvenas ĉe Frank Merla)</p>
<p>La HES klubejo estas malfermita Jhaude ek de 19:30 h. Programo: 20:00 h. Das Haus des Esperanto Vereins Hamburg ist geöffnet donnerstags ab 19:30 Uhr. Programm: 20:00 Uhr</p>	<p>- Esperanto-Eisenbahner -</p> <p>Fervojistoj renkontighas en la stacio Altona, antaŭ la biletvendejo Sabate je la 10.00 h:</p> <p>Pri la detaloj informas Klaus Böhnke</p>

Chu kruc-milito?

Ni ĉiuj estis ŝokitaj pro la teroro en Novjorko kaj Vaŝingtono. Ni funebras kun la Usona popolo. George Bush, prezidanto de Usono anoncis, ke li planas kruc-militon

(crusade) kontrau la terorismo. Chu la vorto kruc-milito ne implicas militon de Kristanoj kontrau la Islamo? La ideo de Bush certe ne estis tia. Sed tiuj Islamanoj, kiuj ankoraŭ ne sekvis al la 'Sankta Milito' povus imagi, ke la 'nekredantoj' nun volas batali kontraŭ la Islamo ĝenerale. Kaj fakte kelkaj ekscesoĵ en Usono montras, ke parto de la popolo kriminaligas la Islamanojn entute. Ankau en Germanio oni vidas tiajn tendencojn, eĉ ĉe kelkaj politikistoj (speciale en CSU). Ĝenerala polica observado de anoj de certa religio estas diskriminacio. Tion ni ne rajtas toleri.

Nia programo

Oktoĉbro 2001	Novembro 2001
<p>4 <i>Chiuj korpe fortaj membroj helpu:</i> Purigado de la klubejo</p> <p>11 <i>Marcos Salas:</i> Lumbildoj pri Ĉilio</p> <p>18 <i>Gerald Roemer:</i> Impresoj el suda Francio</p> <p>25 <i>Benno Klehr:</i> Lingvaj Ludoj</p>	<p>1 <i>Werner Bormann (70 j.):</i> Mia Esperanto-vivo</p> <p>8 <i>Hella Lanka:</i> Raporto pri la 25-jara jubileo en Herzberg - semajnfina aranĝo -</p> <p>15 <i>Hella Lanka:</i> Ekumena Esperanto-kongreso en Zagreb kun lumbildoj el la ĉirkauaĵo</p> <p>22 <i>Frank Merla:</i> Lingvaj Ludoj</p> <p>29 Sen speciala programo pro sabata festo</p>
<p style="text-align: center;">Decembro 2001</p> <p>1 Zamenhoffesto komenco: 19.00 h</p>	

Nova kurso post Du und Deine Welt 2001

La granda ekspozicio, kiu okazis de la 31a de Augusto ĝis la 9a de Septembro allogis proksimume 210.000 vizitantojn. Tio estas 20 % pli ol en la pasinta jaro. Tamen la halo 4, en kiu ni kutime havas nian standon, neniam estas tiom plena kiel la haloj kun sportaj aferoj aŭ tiu kun internaciaj manghajhoj. En halo 4 prezentas sin diversaj shtataj kaj sociaj organizoj.

Per „lotumado“ ni disdonis 180 kuponojn por nia provleciono al interesitoj. Venis fakte 23 personoj; estas pli ol la kutimaj 10%.

Vesna brile



Monika Jessel preparis brilajn verdajn stelojn...

prezentis
nian aferon
kaj fine
alighis 13 al
kurso por
komencantoj
kiu okazu
dum
semajfinoj
en
Novembro.

Husum en 2002

La Germana Esperanto-Kongreso okazos de la 17a ghis la 20a de Majo 2002 en la urbo Husum. Kongresejo estos la Hotelo Theodor Storm, Neustadt 60-68, 25813 Husum.

La Jarchefkunveno de GEA okazos la 19an de Majo 2002 sur ŝipo dum tuttaga ekskurso! Aliaj ekskursoj al Friedrichstadt, Schleswig, vadmaro kaj fokoj.

Rimarkigoj pri la €uro

Chu vi sciis, ke sur la Euro-moneroj nur kvar landoj skribis la nomojn de siaj landoj? Estas Irlando pro la skribo, la reghlandoj Hispanio kaj Nederlando kaj la grandduklando Luksemburgio, sed la lasta ne Franclingve sed estas skribite: Lëtzeburg - en dialekto. En Austrio oni trovas la valoron en vortoj, ekzemple: FÜNF EURO CENT, en Greklando videblas la vortoj Lepto au Lepta, la Grekaj vortoj por cendo(j). *BK*

[Re al Esperanto en Hamburg](#)